

& Konfeso:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis William Auld. Baladigis Martin Strid per nova rekantaĵo kaj modifo de melodio de Sigurda balado, Norda Kantaro #4401.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Estas kiel sapveziko ; efemera mia kanto : ; ja ne temas pri prediko ; nek pri iu politiko.

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas ; Mi pri kredo ne promesas ; kaj malgajon venkis mi ; Tion mi ĝoje konfesas.**)

'2 Mi ne estas reformanto. ; Mia sfero: la liriko, ; kiun verkas diletanto ; sen insista propagando.

'3 Tio fakte ne signifas, ; ke maltrafas min realo – ; novan mondon mi soifas, ; tiucele eĉ aktivas.

'4 Min koncernas aktualo, ; Miajn farojn ĝi motivas. ; Kial do pri klasbatalo ; mi ne kantas kun lojalo?

.....

'5 Jen la kaŭzo staras nude: ; mi tro forte sentas pezon ; de l' inspiro, kiu trude ; trafas koton luktprelude;

'6 do anstataŭ marsejlezon ; mi amkantojn faras lude, ; kaj traktante inkareson ; trovas pri la zorg' forgeson.)